La Fabeloj de Ezopo

en esperanto

Paola Tosato

La Gazza Edizioni

© 2021 La Gazza Edizioni – Pistoia
Tutti i diritti riservati
lagazzaedizioni.com
Traduzione in Esperanto di Paola Tosato,
testo di riferimento: *Le favole di Esopo*, Jacopo Gorini, 2019

Enhavo

Antaŭparolo.....5
Enkonduko.....7
La vulpo kaj la vinberoj.....11
La cikado kaj la formiko.....15
La leono kaj la muso.....19
La kokino kun la oraj ovoj.....23
La lupo kaj la hundo.....27
La leporo kaj la testudo.....31
La rano kaj la bovo.....35
La vulpo kaj la cikonio.....39
La muso kaj la rano.....43
La lupo kaj la ŝafido.....47
La leono kaj la azeno.....51
La urba muso kaj la kampara muso.....55
La paŝtisto kaj la lupo.....59
La korvo kaj la vulpo.....63

Antaŭparolo

"La fabeloj de Ezopo" enhavas ĉiuj moralon kaj allasas sekve perfekte ilojn didaktikajn kaj edukajn en socio, kiel tiu nuna, kie la didaktiko kaj la instruado iĝis nepraj por trovi la propran dimension. Tiuj ĉi fabeloj estas konataj en la tuta mondo, do ili povas konstitui solidan bazon por lernado de nova lingvo je universala karaktero kiel Esperanto. Pro tiaj kialoj mi kaj la aŭtoro, Jacopo Gorini, decidis proponi novan tradukon, kiu riĉigas la jam grandan panoramon de la literaturo en esperanto kaj kiu ebligas al studentoj je baza nivelo alproksimiĝi al tiu ĉi belega idiomo kaj pliprofundigi la konon pri tio. Oni povas lerni do ĉi tiun libron en maniero amuza kaj malpeza. La libro estas taŭga por la infanoj, kiuj kapablas lerni facile kaj rapide, sed ankaŭ por la plenkreskuloj, kiuj povas tiel rilaksiĝi per legado flua kaj agrabla.

Mi dankas finfine profesoron Carlo Minnaja pro lia kontribuo pere de zorgema revizio. Restas al mi nur bondeziri al vi bonan legadon kaj inviti vin al malgrandaj prikonsideroj kiuj povas fonti el la verko.

Paola Tosato

Enkonduko

Ezopo estis helena verkisto, naskiĝinta proksimume en 620 a.K. kaj mortinta en Delfo en 564 a.K.

Pri lia vivo la informoj estas malcertaj kaj kontraŭaj: ŝajnas ke li alvenis el Grekio kiel sklavo kaj ke li poste ricevis la liberecon. Li estus vojaĝinta tra la tuta Oriento, atingante Babilonon kaj Egiption, ĝis la morto en Delfo.

Li estas indikata kiel la inventinto de la fabela ĝenro, kies karakterizoj estas mallongaj rakontoj kun bestoj kaj personoj por reprezenti la homojn kaj kun la eksplicita celo komuniki moralon.

Liaj rakontoj estis origine transdonataj voĉe, tamen dum la jarcentoj ili estas tradukitaj kaj adaptitaj de granda verkistoj de fabeloj, inter kiuj Fedro (20/15 a.C. proksimume – 51 d.C proksimume) kaj Jean de La Fontaine (1621–1695), el kies versoj inspiriĝis la jena volumo.

Kelkaj fabeloj ("La kokino kun la oraj ovoj", "La rano kaj la bovo", "La muso kaj la rano", "La lupo kaj la ŝafido", "La paŝtisto kaj la lupo", "La leono kaj la azeno") finiĝas per morto de tiu aŭ tiu ĉi besto kaj povus timigi la etulojn, oni konsilas sekve la legadon nur kun la gepatroj ĉeestantaj.

En la originaj tekstoj ĉeestas moralo, ofte influita de la kultura kaj religia kunteksto de tiu epoko. En ĉi tiu versio de la fabeloj ni preferis ne transporti ĝin kaj lasi al la leganto personan interpreton pri la signifo de la rakonto.

Ĉiu fabelo de tiu ĉi kolekto estas provizata per vortaro kun bildoj de la vortoj plej gravaj.

Elŝutu la aŭdlibron:
www.lagazzaedizioni.com/ezopo/

La vulpo kaj la vinberoj – Vortaro per bildoj

la vulpo:



la arbaro:



la glano:

la kamparo:

la kokino:

la ovo:

la vito:

la vinberaro:

La vulpo kaj la vinberoj

Estis iam vulpo kiu estis ege malsata, sed ĝi trovis nenion por manĝi: ĝi ne ŝatis la glanojn kaj la etaj bestoj forkuris kiam ili vidis ĝin.

Sekve la vulpo iris en la kamparon por trovi ion por manĝi.

Ĝi serĉis ovojn de kokino aŭ de etaj kokoj, sed estis nenio ie ajn.

Ĝi estis ĉiam pli malsata kaj ne sciis kion fari. Ĝi do decidis veni returne.

Dum ĝi iris al la arbaro ĝi vidis viton kun belega vinberaro kiu brilis je la suno.

Tiu ĉi estis tre alta kaj la vulpo saltis per ĉiuj siaj fortoj por preni ĝin.

Ĝi provis kaj reprovis, sed tiu estis ĉiam tro malproksima.

Finfine ĝi rezignis kaj diris: – Tiu vinbero ne estas ankoraŭ matura kaj mi ne ŝatas la vinberojn nematurajn.